REGULARO DE REU PRI LA KLUBA RANGLISTO

Akceptita de la 20-a Konferenco en Volgogrado, 23.02.04

1. Ĉefaj principoj

1.1. Celo de la *Kluba Ranglisto* (plie – *RoKo*) estas objektive taksi la agadon de rusiaj E-kluboj.

1.2. Kurantaj kaj finaj rezultoj de *RoKo* estas konstante kolektataj de la *REU-Komisiito pri RoKo* (plue – *Komisiito)* kaj regule publikigataj en E-periodaĵoj.

1.3. Ĉiu klubo estas mem interesita disponigi akuratan detalan raporton pri sia agado al la *Komisiito*.

1.4. La kluba Estraro respondecas pri ĝusteco kaj vereco de ĉiuj donitaĵoj en la raporto.

1.5. Ĉiujn disputajn demandojn solvas la Estraro de REU.

2. La Poenta Sistemo

2.1. La *Poenta Sistemo* de *RoKo* estas ellaborata de la *Komisiito* kaj konsideras konkretajn E-aktivadojn. La *Komisiito* rajtas laŭbezone modifi kaj aktualigi la *Poentan Sistemon* konforme al la nuntempa situacio en la E-movado. La baza *Poenta Sistemo* kaj ĉiuj ŝanĝoj en ĝi estas konfirmataj de la Estraro de REU.

2.2. La laboron pri poentado faras la *Komisiito,* kiu mem aktive kolektas informojn pri E-agado de koncernaj kluboj kaj rezulte informas ilin pri la akiritaj informoj kun celo pli objektive kaj plene respeguli ties agadon.

2.3. La poentado estas farata laŭ jenaj ĉefaj direktoj:

– organiza aktivado;
– instruado diversnivela;
– pormovada aktivado;
– porekstera aktivado;
– enkluba laboro.

3. Devoj kaj rajtoj de la REU-Komisiito pri RoKo

3.1. La *Komisiito* laboras en kontakto kun la Estraro de REU. La *Komisiito* estas elektata de la Konferenco aŭ Estraro de REU, pri kio aperas publikigoj en REU-dokumentaroj kaj en E-periodaĵoj.

3.2. La *Komisiito* devas:

– konstante kontakti kun plej ebla multo de la kluboj, aliĝintaj al REU aŭ ne;
– akurate kalkuli poentojn laŭ disponigitaj kaj akiritaj informoj pri E-aktivado de kluboj;
– regule (ne malpli ol 2 fojojn dum jaro) publikigi la aktualan staton de *RoKo*;
– decembre pretigi kompletan finan *RoKo-n,* kiu devas esti publike anoncita dum Rusia Esperantista Kongreso (REK), aliaj E-aranĝoj kaj en E-periodaĵoj.

3.3. La *Komisiito* rajtas:

– rekte komunikadi kun E-kluboj kaj aliaj E-kolektivoj de Rusio;
– peti detaligi, precizigi tiun aŭ alian agaderon de la koncerna klubo;
– nuligi la poentojn por tiu aŭ alia dubinda agadero kun detala klarigo al la klubo kaj paralele – al la Estraro de REU.

SUPLEMENTO: L A B A Z A P O E N T A S I S T E M O

1. Organiza aktivado:

1.1. Aliĝinta al REU, REJM – 10
  1.1.1. Por ĉiu kotizinta membro de REU, REJM – +1/membro
1.2. Por postenigita membro de klubo en landa organizaĵo – +5/m
1.3. Por Delegito de UEA – +3/m
1.4. Por individuaj membroj de UEA – +2/m
1.5. Jure registrita – +10

2. Instruado diversnivela de E-o:

2.1. Por ĉiu E-kurso – 5
  2.1.1. Por ĉiu kursfininto – +2/persono
2.2. Por ĉiu plenuminto de ĈALK-ekzameno:
  2.2.1. A – +2/p
  2.2.2. B – +10/p
  2.2.3. C – +20/p
2.3. Havas E-instruiston
  2.3.1. neatestitan – 10
  2.3.2. B-atestitan – 25
  2.3.3. C-atestitan – 50

3. Pormovadaj aranĝoj:

3.1. Organizis E-aranĝon kun partopreno de aliurbaj personoj:
  3.1.1. malpli ol 10 – 20
  3.1.2. malpli ol 30 – 30
  3.1.3. malpli ol 50 – 50
  3.1.4. pli ol 50 – 100
3.2. Loka E-seminario/E-aranĝo – 20

4. Porekstera agado:

4.1. Artikolo/elpaŝo en amaskomunikilo:
- 4.1.1. centra – 50
- 4.1.2. regiona – 30
- 4.1.3. loka – 10

4.2. La klubo estas organizanto de
- 4.2.1. tuturba aranĝo (LF ks) – 100
- 4.2.2. koncerto, elpaŝo kolektiva – 50
- 4.2.3. lekcioj, ekspozicio – 20

4.3. Partoprenis en urba aranĝo kun mencio pri Eo – 10
4.4. Kunlaboras en urbaj instancoj – 20
(organizaĵoj ĉe urbestrejo, komisionoj de urbestraj fakoj; same – regionaj instancoj)

5. Enkluba laboro:

5.1. La klubo kunvenas
- 5.1.1. ĉiusemajne – 20
- 5.1.2. 2-3-foje monate – 10
- 5.1.3. malpli ofte – 5

5.2. Partopreno en E-aranĝoj – 2/membro
5.3. Eldonas kluban ĵurnalon – 20
5.4. Havas aktualigatan 2-3-foje jare retpaĝon – 15
5.5. Kunlaboris por aliurba E-aranĝo – 20
5.6. Partoprenis en LONo aŭ BeLego:
- 5.6.1. 1-a loko – 20
- 5.6.2. 2-a loko – 10
- 5.6.3. 3-a loko – 5
- 5.6.4. partopreno – 1/m

5.7. Artikolo de klubano en:
- 5.7.1. landa periodaĵo – 10
- 5.7.2. internacia periodaĵo – 20
- 5.7.3. RET-info – 2

5.8. Adreso de klubano en PS – 2
5.9. Eksterlanda gasto:
- 5.9.1. akcepto – 5
- 5.9.2. helpo – 2

6. Apartaj aktivadoj

– laŭ decido de la Estraro de REU, surbaze de motivita kluba peticio: 1–200

RIMARKO: Ĉiu menciita aranĝo, periodaĵo ks en la kluba raporto devas esti konkretigita.

EVENTUALE MODIFINDA ALVOKO POR LA "KLUBA RANGLISTO"

En la 19-a Konferenco de REU (Puŝĉino, 2002) estis vigle diskutita la temo pri la kluba agado. Kiel organizita formo de pores-peranta aktiveco ĝi estas konsiderata kiel tre grava por sukceso de E-movado en Rusio. Bedaŭrinde, dum lastaj 10-15 jaroj la kvanto de E-kluboj signife falis. Tion kaŭzis kaj objektivaj cirkonstancoj, kaj subjektivaj. Kaj el tiuj malmultaj sukcese agadas eĉ pli mal-multaj.

De alia flanko, ioma socia stabiliĝo dum lastaj 3-4 jaroj donas esperon, ke grava parto de E-movado kiel E-kluboj povas jen reak-tiviĝi, jen aperi. REU-Estraro esperas, ke E-kluboj en Rusio plimultiĝos kaj ilia rolo iĝos pli aktiva. De sia flanko REU ĉiurimede helpas kaj asistas por tiu agado: en la antaŭa Jarlibro estis teksto pri tio, kiel registri E-klubon, kiel verki statuton k.a.

Antaŭ kelkaj jaroj estis iniciatita konkurso inter E-kluboj – "Kluba Ranglisto" (RoKo). Ĝia celo estas objektive taksi sukcesojn de kluboj surbaze de poentara sistemo. Por levi intereson pri partopreno en la konkurso, aperis ideo establi la Fonduson "Kluba Ran-glisto" por mone premii la gajnintojn en la konkurso. En marto 2003 la Regularo pri la fonduso estis aprobita de la REU-Estraro.

REU-Estraro kaj Komisiito pri RoKo alvokas ne heziti montri siajn atingojn kaj sukcesojn al la Esperanto-popolo! Kaj aktive partopreni en la konkurso. Des pli, ke pleniginte simplan formula-ron vi povas gajni monon por via klubo!